



TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

J A R A B O N O

P. BABIN

Jarabono : 65 fkoj

13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes

P.C.K. Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1987 - 1

(JANUARO-FEBRUARO-MARTO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... La trogioditoj en la Loire-valo.



... Ikonoj.

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
Pri Grésillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Trogloditoj en la Loire-valo	3-4
Al la Luno	5
Konoj (trad. S. Boniol)	6-7
Paĝo de la geknaboj (Audrey)	8
La Mapuo (Em. F. Gouthier)	9
Kolumnio (A. Ĉekov)	10-11
Raŭvia Distro	12
la Vie de Grésillon	13-14

El Grésillon

Vi jam legis en aliaj revuoj, ke la "patrino" de Grésillon forpasis fine de 1986. Multaj el vi konis ŝin, eble ne ŝian diskretan agadon. Sur la paĝo 13 de tiu ĉi numero vi trovos adiaŭan artikolon pri ŝi.

Sed Grésillon devas pluvivi. Pri la venonta somero alvenas informetoj kaj aliĝoj el ĉiuj kontinentoj. Maniero festi la Jubilean Jaron estas ankaŭ montri kaj vivi la internaciecan vivon de la kontaktoj inter esperantistoj. Necesas agi ĉe la altaj instancoj. Tion efike faras la responduloj de niaj asocioj. Necesas sed ne sufiĉas. Gravus ankaŭ la agado de la grup-formikoj. Se vi konscias, ke esperanto alportis al vi "pluson" konigu tion ĉirkaŭ vi. Ne nur informu pri tiu pluso viajn samfamilianojn, viajn geamikojn,

viajn najbarojn, sed montru ĝin. Montru, kion vi atingas dank'al esperanto. Okazigu la demandojn. Montru, kiel fortuna vi estas. Ĉi pruvus per ekzemploj. Pruvi, ke esperanto efikas ankaŭ por la ne-esperantistoj. Ne agu nur, kiel esperantistoj. Agu, kiel "homo esperantus".

ESPERANTO 100-JARA

1987:

ESPERANTO-DOMO GRESILLON 35-JARA

Venis al Grésillon kaj Kulturaj Kajeroj multaj bondezir-leteroj. Ne estis eble respondi al ĉiuj. Ni dankas kaj kore recipokas tiujn bondezirojn. Grandan dankon al tiuj kiuj aldonis ĉekon, kelkafoje altsuman.

Esperanto tra la Mondo

LA UNIVERSALA KONGRESO EN VARSOVIO-

Oni jam kalkulas, ke 5 000 aŭ pli da personoj ĉeestos. Estas antaŭviditaj almenaŭ dek teatraj prezentaĵoj, dudek koncertoj, dekduo da ekspozicioj, k.t.p.

La temo de la kongreso estos: "Esperanto: 100 jaroj da internacia kulturo". Krom la prelegserio de la Internacia Kongresa Universitato, okazos aparta scienca konferenco, kiu traktos la centjaran jubileon laŭ kvar aspektoj: lingvistika, historia, sociologia kaj kultura.

S.A.T. KAJ SAT-AMIKARO- La kongreso de SAT, en Bolonjo ĉe Maro (22-29/8) prezentos allogan programon. Okazos postkongreso en Grésillon.

La 42-a kongreso de SAT-Amikaro okazos en Vaison-la-Romaine (18-21/4) en la Kultura Centro "A Coeur Joie". Tre interesaj ekskursoj estas planitaj. Informas: Gemma Rassouw, chemin Ste Croix, F-85110 Vaison.

ALIAJ RENKONTUJ- La 10-a Internacia Semajno okazos en la mediteranea havenurbo SETE (13-20/9-87). Informas: Esperanto, 5, rue du Dr Roux, F-34000 Montpellier.

La 50-a Internacia Kongreso de la verkista Asocio "Pen Club" okazos en Lugano, Svislando (10-17/5-87). Speciala seminario dediĉita al esperanto okazos la 14^a je la 16-a horo. Informas: Dr Tazio Carlevaro, via Alberto di Sacio 9, CH-6500 Bellinzona.

LA CENTA DATREVENO- La Eŭropa Esperanto Centro organizis specialan akcepton la 9/3 en la Palaco de Eŭropo en Bruselo, por ĉiuj eŭropaj parlamentanoj.

Akcepto por reprezentantoj de la eduka medio okazis en Vaŝingtono. En Aŭstralio, nacia konferenco okazis en Armidale, sub la prezido de Prof. Ronald Gates, antaŭa prezidanto de la Unesko-komisiono kaj kiu speciale lernis esperanton. En Budapeŝto, okaze de printempa esperanta teatra festivalo, la Nacia Biblioteko aranĝos grandan libran ekspozicion. En Vieno, fine de oktobro, okazos en la viena universitato, Internacia Scienca Simpozio. En Hispanio, okaze de

la Kataluna Kongreso en Leida, prelegserio estis prezentita ĉe la loka universitato; en Zagrebo, speciala semajno "Cent jaroj de esperanto-kulturo" okazos tuj post la kongreso de Varsovio; Flandra Esperanto-Ligo preparas unutagan programon en decembro...

LA PREMIO ZAMENHOF- Tiu premio estis kreita de UEA en 1985 por distingi elstarajn personecojn, kiuj laŭ la opinio de la tutmonda esperantistaro aparte kontribuis al la monda paco kaj internacia kompreniĝo. Ĉi-foje la premio estis S-ro Amadou Mahtar M'bow, la ĝenerala direktoro de UNESKO. Inter la ĉeestantoj de la transdona ceremonio estis s-ro Martinet, eminenta franca lingvisto, kiu kunlaboris kun I.A.L.A. sed nun deklaras sian simpatian al esperanto. La parolado de S-ro Claude Piron estis tre interesa kaj konvinka.

SPECIALAJ FILATELAĴOJ- Oni estas informita pri la apero de speciala poŝtmarko en Kubo kaj de Filatela "bloko" en Germana Demokrata Respubliko okaze de la centa datreveno.

DIVERSAĴOJ- La normanda urbo Vire eldonis turisman broŝuron, kiu entenas tekston en esperanto. Havebla ĉe Office de Tourisme F-14500 Vire.

TRADUKRETO INTERNACIA proponas tradukon pere de esperanto de tekstoj en ĉiujn lingvon. Ĉerĉas kompetentajn tradukistojn. C. Bodson, Montigny en Cis, F-59225 CLARY.

INTERNACIA ASOCIO DE HANDIKAPITAJ ESPERANTISTOJ havas peranton en Francio: Michel ROBERT, E 10, Boul. Jacques Duclos, F-83130 La Garde.

ESPERANTO-MOVADO EN KUBO- Laŭ raporto konfirmiĝas, ke esperanto kontentige disvastiĝas en Kubo kun pli ol 2 000 lernantoj en la kursoj. Adreso: Kuba Esperanto-Asocio, apartado postal 2018, La Habana 2, Provincia Ciudad de La Habana, Kubo.

Trogloditoj en Loire-valo

Serĉante en PIV oni legas: "Troglodito: homo konstante loĝanta en kaverno (uzata speciale pri la prahomoj). Sed kial reiri al tia antikva periodo? Ĉiuj bone scias, ke ĉie en la mondo, kie la grundo tion ebligis, homoj uzis tiajn kavaĵojn je plej diversaj uzoj: hejmoj, temploj, malliberejoj, tombejoj, ktp.

Multaj el vi, karaj vizitantoj de Gresillon, scias, ke ne malproksime de nia Kultura Esperanto-Domo, en valoj de la rivero Loire kaj ties alfluo, ankoraŭ nun familioj vivas troglodite, kvankam komforte, dank'al interna modernigado. Turistoj surpriziĝas pro la stranga allogeco de kelkaj el tiuj kelaj loĝejoj, kies kamenoj elŝprucas el herbejaj aŭ ĝardenaj tegmentoj, kies pordoj kaj fenestroj, en la roka fasado, estas ornamitaj de plantoj kaj riĉkoloraj floroj. Kvankam tiaj enloĝataj lokoj ne estas larĝe malfermitaj al nekonataj promenantoj, tamen estas multo por esplori.

Ja, oni ne povas silenti pri la agado de arkeologoj kaj ankaŭ de bonvoluloj, kiuj nepre deziras konservi per posteuloj konkretajn postsignojn de plej malnovaj civilizoj. Ili sukcesas levi al siaj aspiroj multe da ĝejnuloj, skoltoj, studentoj, laboristoj, kiuj ĝoje pasigas liberajn horojn serĉante kaj renovigante. Oni ne kredas, ke senescepte temas pri pitoreskaj praavaj loĝlokoj. Estis epokoj, multe pli proksimaj al ni, kiam, pro diversaj kialoj, ne nur simplaj kamparanoj sed ankaŭ nobel-sinjoroj, riĉaj bienposedantoj, religiaj institucioj elektis tiajn kelo-domojn. Mirigas nin la interno de tiuj grotoj kun altaj belegaj kamenoj kaj diversaj dekoracioj arte skulptitaj en la roko mem dum la Renesanca periodo.

Kio instigis prahomojn elekti tiajn rifuĝejojn? Ĉu ni mem, en okazo de pluvego aŭ fulmotondro aŭ pro timo de homaj armiloj ne kurus, se estus en la proksimeco, al protektanta enroka krutaĵo? Verŝajne niaj praavoj same faris, kaj, pli malpli rapide, iris de

la natura, ne ĉiam perfekta, rifuĝejo al pligrandigo de en- aŭ sub-roka ŝirmejo antaŭ ol krei mem kelajn domojn, kiam ili trovis terenojn samtempe fortikajn kaj facile tranĉeblajn, ankaŭ la necesajn ilojn.

En la orienta parto de Anĝuo, ĉe rando de la tiel nomita "Pariza Baseno", prahistoria maro, larĝa kreta zono superas per siaj altaĵoj la maldekstran bordon de Loire kaj ties alfluo. En tiu sufiĉe mola krutaĵo la homoj, tre frue, sciis bori domojn en plej konvenaj lokoj. Konstanta spertado kondukis ilin en serĉadon de plej taŭgaj geologiaj tavoloj, ne nur facile tranĉeblaj sed kies rezistadon al defalado ili tre rapide scipovis kalkuli. La plej modestaj estis kreitaj de la loĝanto mem sen helpo de masonisto. Li bori fenestron kaj pordon tra la kalka ŝtono, la regiona "tufo", kaj ni povas fidi je lia eltroveno por solvi iaman loĝado-krizon, kiam infanoj iĝis tro multnombraj. Al li sufiĉis bori flankan ĉambron! Laŭpove troglodito ĉiam elektis plej bonan orientiĝon kaj malfermis la kavaĵon fronte al la suno. Ĉiumaniere tiaj domoj estis multe pli komfortaj ol oni povas supozi kompare kun tiamaj kamparaj domaĵoj. Tute ŝirmitaj kontraŭ la vento, je konstanta temperaturo, ili posedis interne kaj ekstere ĉion necesan por familia kaj profesia vivo de la loĝantoj. Bordo de riveroj, kie la konstruanto havis je sia dispono altan monteton ebligantan krei pli lumigatan etaĝdomon, la necesaj internaj ŝtuparoj fakte konsistis el suprenirantaj tuneloj boritaj en la roko mem, kun kruta deklivo preskaŭ vertikala, sufiĉe larĝaj kaj altaj por unu persono. Tiuj ŝtuparoj kondukas ne nur de malsupraj al supraj ĉambroj, sed povas pluiri el la tegmenta ĝardeno kaj tiel ebligi rektan legomprovizadon. Oportune, ĉu ne, kiam pluas aŭ frostas! Sed okazis, ke trogloditaj kolonioj, aliloke submetitaj al plej urĝaj bezonoj ĉe malsamaj topografiaj lokoj, ekzemple en la 5-a jarcento okaze de barbaraj invadoj, devis

plej rapide trabori protektantajn subterajn domojn. Tiaokaze la loĝejo ne plu konsistas el pluretaĝaj ĉambroj en rok-flanko sed etendiĝas samnivele, subtere. Surtera enkavigita voĵeto iras de unu kelo al aliaj grupigitaj en vilaĝetoj ofte en formo de duoncirklo. En sama regiono tiaj domoj ankoraŭ videblaj, kaj ofte enloĝataj, estas duone subteraj kaj ricevis, fasadon el tajlitaj ŝtonoj kaj antaŭ-tegmenton por protekti la enirejon, kiu malfermiĝas ĉe korto samnivele duon-borita en la grundo.

Aliaj esence subteraj, kun alirejoj put-formaj ne plu estas, jam delonge, uzataj kiel loĝejoj. Plej ĝenerale ili estis minejoj el kiuj oni eltiris, el la faluna tavolo, la belajn blankajn ŝtonojn por konstrui katedralojn, kastelojn aŭ simplajn domojn. Dumtage la ministoj laboris funde de galerioj ĉiutage profundiĝantaj kaj vespere ili retrovis la familion en kavaĵo speciale borita por ili ĉe la enirejo de la labor-loko. Sed dumvintre, masonistoj venintaj el malproksimaj regionoj, eĉ landoj, trovis loĝejon en la minejo mem. Poste tiuj kelegoj fariĝis ŝirmejoj por la vinoj aŭ por ilia transformado en ŝaum-vinon. Aliaj estas nun industriaj kultivejoj de fungetoj.

Ni eniru en trogloditan loĝejon. Ĝenerale iu krado el ligno, poste el metalo, defendis la enirejon kontraŭ la noktaj, maloportunaj aŭ danĝeraj vizitoj. La pordo el ligno konsistas el du partoj. Laŭ la sezono aŭ vetero oni povis malfermi la supran, kiel fenestron kaj lasi fermita la suban, kiel protektilon kontraŭ la eniro de kortaj bestoj.. La fenestroj, en formo de rektanguloj, estas pli larĝaj interne por enirigi la maksimumon da ekstera lumo. La lignaj ŝutroj estis internaj. La kela planko plej ofte konsistas el la zorge niveligita roko. Ankaŭ la vandoj plej ĝenerale restas nature rokaj kun videblaj markoj de la pik-pioĉo, sed okazis ke oni surkovris ilin per kalko-lakto aŭ mortezo por ebenigi ilin. La volboj, ĉiam simplaj ĉe la kamparanoj povis, ĉe nobeloj, ricevi

pli artajn formojn de trapezo, arko aŭ kupolo laŭ la tiamaj modo. Kelkfoje ĝis 6-metrojn altaj ili estis subtenitaj per ŝtonaj pilieroj. Por plia komforto la troglodito foje instalas plafonon, kiu malebligis la disfalon de rokpolaĵoj, vintre malvastigis la hejtatan kub-mezuron kaj donis subtegmentejon por la legom-provizaĵoj.

La imag-povo de niaj praavoj estis granda. Ili formis el aŭ en la roko la necesajn aŭ dekoraciajn utilaĵojn. Ĉefa bezono en iu ajn domo: la fajrejo. En troglodita ĉambro la kameno estas tre proksima al la fasado, la sola ĉambro-parto, kiu ricevas sufiĉe da lumo. La kamentubo, ekstere, superstaras la grundon je du metroj. La kameno estas ampleksa. Ĝi estis la koro de la domo pro sia utileco kaj sia altiro al familia rondo. Ĝi estis la ĉefa ornamaĵo pro siaj formoj kaj skulptaĵoj. Ĉe ambaŭflankoj de la fajrejo estas niĉoj kun benkoj tajlitaj en la roko. Plej praktike estis aranĝita en apuda kavaĵo granda lesiv-kuvo el kuiritaj argilo. Alia nepraĵo estis la bakujo por kuiri la familian panon. Foje ekzistas dua malgranda forno por sekigi la nigrajn prunojn. En la muroj ekzistas multaj kavaĵoj diversgrandaj je diversaj altecoj: ili konsistigis la ŝrankojn. Por la litoj oni kreis enrokajn alkovojn eventuale kaŝeblajn per kurtenoj. La puto estis en la kelo. Dank'al internaj anfraktoj oni povis malsupreniri ĝis la akvo-nivelo kaj atingi sekretan kavaĵon eĉ hom-kaŝejon aŭ tunelon al la ekstera mondo.

El tio ni povas kredi, ke neniukaze la troglodita vivo estis pli malagrabla ol en tiamaj subĉielaj domoj. Kontraŭe. El rakontoj de miaj geavoj ŝajnas, ke la trogloditoj, ofte posedantoj de sia kel-domo, estis, kvankam ofte malriĉaj, malpli ligitaj al bien-posedantoj ol farmistoj kaj dumlonge konservis proprajn pens- kaj viv-manierojn.

el prelego de


B. CHEVERRY

AL LA LUNO

La homo nun atingis tion, pri kio li jam dum multaj jarcentoj revadis. Vi ne devas pensi, ke la vorto "spacveturo" estas ligita nur al sputniko kaj Kabo Kanaveral! Antaŭ trimil jaroj la babilonanoj jam precize projektis vojaĝon al la luno, kaj en la daŭro de la tempoj pluraj planoj kaj provoj estis farataj. Nun ni klare vidas, ke tiu distanco de 400 000 kilometroj ne povis resti nevenkebla. Ekzistas eĉ kelkaj bildoj de spacoŝipoj, per kiuj oni volis riski la veturon ĝis la luno. La plej multaj restis nur bildoj, kaj nur kelkajn oni efektive konstruis kaj elprovis. Kio instigis la homon ĉiam denove fari novajn provojn? Eble nur scivolemo?

En la jaro 1650 la franco Cyrano de Bergerac pendigis sur sian korpon botelojn plenajn de roso. Li pensis, ke kiam la suno vaporigos la roson, la aero en la boteloj suprentiros lin al la ĉielo.

En la dek-oka jarcento kelkaj fantaziuloj faris sensukcesajn klopodojn por atingi la lunon helpe de magneto.



Aleksandro la Granda (356—323 antaŭ Kristo), la fama reĝo de Makedonio, dum sia legenda vojaĝo al la luno. Bildo el mezepoka libro.

Laŭ malnova legendo ankaŭ la fama antikvepoka Aleksandro la Granda provis atingi la lunon. Li ligis du grifojn (°) al kaĝo, en kiu li mem staris. Super si, sed ĉiam ekster la atingpovo de la grifoj, li tenis sur stango buĉitan ŝafon. La malsataj grifoj ĉiam pli rapide flugis supren por povi kapti la ŝafon. Ili estis vere miraklaj bestoj, ĉar ili povis elteni tiun vanan flugadon dum la tuta vojo de kvarcentmil kilometroj! Ke la granda Aleksandro desegnis karton pri la malantaŭa flanko de la luno, tion la legendo nek asertas nek neas.

En la jaro 1500 la ĉina imperiestro Van-Hu faris la unuan provon por atingi la lunon helpe de raketo. La 47 raketoj, kiuj estis ligitaj al lia tronseĝo devis porti lin en la aeron dum li tenos sin en ekvilibro per flugdrakaj ventumiloj. Sed la raketoj eksplodis antaŭtempe. En la jaro 1865 Jules Verne, la fama franca aŭtoro de fantaziaj romanoj priskribis en sia libro "La vojaĝo al la luno" spacoŝipon, kiu povis enteni tri homojn kaj du hundojn. Kiam unu el la hundoj mortis kaj estis ĵetita en la spacon ĝi restis ŝvebanta en la orbito de la fluganta spacveturilo. La fantazio de Jules Verne estis mirinde trafa!

(°) grifo = mitologia besto, duone leono kaj duone aglo.

- El "La Praktiko"

Ikonoj

Ikono en la greka signifas bildon. Ikono prezentas la realon de la mondo, kiu ne estas portempa. Sed tiu bildo, plej altgrade slava, apartenas al ortodoksismo kaj al la orientita kristanaro de Romo apartigita dum la XV-a jarcento.

Ikono estas iu figura bildo atestanta la diigon de homeco. Kaj ni rimarkas, ke dum la ikona kontemplado, la homa kreitaĵo estas tirata al komunikado kun la nemateriaj fortoj de l'universo. Fine la homestaĵo kapablas ricevi mesaĝon el la Plej-Alta venantan.

En Bizanco kaj en Oriento ikono ekaperas dum la V-a jarcento. Ni scias, ke la preĝejoj en la tieaj imperioj nur malmultajn ikonojn posedis. Estas vere, ke tiuepoke la sankteja ornamado estis nur surmura. Tiam la bildo estis freske pentrita aŭ mozaikpece muntita, por ke ĝi estu translokebla kaj ke oni povu ĝin depreni de la muroj kaj malsuprenirigi inter la fidelulojn.

Sed estas certe, ke tiuepoke ikonoj ne troveblis en la domoj de la kredantoj. Pli poste, kiam la Slavoj kristaniĝis, la Grekoj kaj Bizancanoj alsenditaj por ornamo la rusajn sanktejojn ne montriĝis sufiĉe multnombraj por plenumi la taskon. Tial, inter la tieaj loĝantoj tiuj konstruemoj disĉiplojn edukis. Kaj ĉi-lastaj pentris. Al tiaj freŝbakitaj inspiroplenaj fervoruloj la surmuraj figuroj ikone prezentataj aspektis tro grandaj, tro altaj, tro foraj. Pro tio pli malgrandajn dimensiojn akceptis la ikonoj por iĝi moveblaj, portebaj. Kaj jen tre rapide ili eniras domojn kaj kabanojn por troni meze de negrandaj preĝoĉambroj, kie bruladas la flamoj de noktolampetoj, simbolo de l'animo. La "personaj bildoj" tiam ekakceptas profundan signifon, laŭ kiu la koloro, la transfigurita materio, fariĝas la atestanto de gloroplena tempo.

Finfine depost la XI-a jarcento la Slavoj, post la venko de la ortodoksuloj super la ikonoklastoj

(bildorompistoj), elmetas pli kaj pli multenombrajn kaj etapoproporciajn ikonojn sur la ikonostazon. La ikonostazo, en ĉiu ortodoksa preĝejo, estas tiu vando, kiu apartigas la navon disde la sanktejo kaj simbolo prezentas la apartigon de dieco disde homeco kaj de eterno disde nedaŭro.

La ikonostazo ĉe la ortodoksuloj daŭre uzata estas ornamita de malsupre supren per svarmo da ikonoj rigardantaj la fidelulojn. Tiele, tia kolorriĉa remparo eligas helecon, per kiu la "transfigurita materio" tuŝas la rigardon ĝiskaptonte. Fakte kaj tiucele - nome la kredanton fascinonte -, la ikonoj ne estis pentritaj sen longa truddeviga sinpreparado de la artisto sur fizika kaj spirita kampoj. Li estis monaĥo aŭ religiulo kaj antaŭ ol realigi la bildon li sin dediĉis al meditado kaj preĝado dum li fastis.

La Primitivuloj dum la fama rusa epoko, kiuj ĉiujn preĝejojn ornamis en la Imperio, respektis difinitajn konvenciojn, pentrotradiciojn kaj kutimojn. Ili tiel obeis regulojn de la ekleziaj patroj truditajn: precizajn formojn kaj kolorojn rilatantajn al ikona pentromaniero, respondantajn ian simbolismon kaj tutan kuntekston de liturgiaj kanonoj.

LINIOJ KAJ FORMOJ- Gravas formo kaj linio en la ikona esprim-sistemo. Grafismo estas direktita laŭ difinita ordo kaj esprimiĝas per kodo transdonita al ikonpentristo. La rektaj linioj prezentas la personon en harmonia ekvilibro starantan kaj ligitan kun la universo de la starigitaj fortoj. Kiam vertikalas la ĉi-koncernaj linioj, tio signas la eblecon ascendi, en la ĉielon supreniri: jen pozicio al spirita leviĝo proksima, la individuon metanta en la staton de nepezeco - kio tiras al bonstato.

KURBAJ LINIOJ- La kurbaj linioj rilatas al la sentokapablo kaj ĝojoj de l'tero, ekkomunikiĝanta kun la rektaj linioj celantaj la ĉielon kaj ties beataĵojn. Jen protektado konstatebla en la rondaĵoj

de ĉiuspeca patrineco, en kiu la ventro fariĝas kreocentro lige kun la dieco.

VIZAĜO KAJ PENTROKONVENCIOJ- Sufiĉe frue okazis specialiĝo en la laborejoj de la ikonpentristoj frekventataj. La plej lertaj artistoj, la mastroj, estis komisiitaj realigi la vizaĝojn: ili nomiĝis "vizaĝistoj". La vizaĝistaj lernantoj pentris nur la korpojn, detalojn, fonojn: ili nomiĝis "pre-vizaĝistoj". El inter la konvencioj ni citu la jenan: la roluloj estas pentritaj fronte aŭ duonprofile, ĉar tre gravas la vizaĝo. Neniun rolulon atingintan sanktecon ni vidas laŭprofile. Evidentas, ke profila pozicio interrompas komuniĝon, unuecon, kaj estas perceptata, kiel ekforesto. En ikonarto tolerata estas profilo por tiuj, kiuj ankoraŭ ne atingis sanktecon: ŝafistoj, soldatoj, magoj, spektantoj aperantaj en liturgiaj scenoj. Do en venerado de la vizaĝoj de Kristo, Maria Virgulino, la Evangeliistoj kaj ĉefanĝeloj - tiuj perantoj inter homoj kaj la Plej-Alta - jen dronadas laŭ intensa kontemplado la kredanto kun "blindigita" rigardo. Sed precipe ĉe la figuro de Maria Virgulino jen la okulo trafas la plej grandan multfacetecon, la plej grandan esprimoriĉon: iajn animstatajn rebrilojn, kiuj donas al la bildo sian lumoplenan kaj gloran aspekton.

ELEKTADO PRI LA KOLOROJ- La ikonpentristo uzis vegetalajn farbojn kaj paletron entenantan 24 bazajn kolorojn. Li tempere laboris, uzante, kiel gluilon, krudan ovoflavon diluitan en sekala biero. La ekzistanta ekvilibro inter ambaŭ pensoj kaj sentocentroj, inter la rektoj kaj kurbaĵoj, la koloroj kaj formoj, jen la vojo, kiu etendiĝas antaŭ la artisto, sur kiu ĉi-lasto renkontas la Tradicion.

La fama ikonpentristo Andreo Rublev (XV-a jarcento), uzas sur siaj pentraĵoj la lazurŝtonan bluan. Kaj dank'al la uzado de tiu nuanco li liveras al la okuloj de la kredantoj la impreson pri ia stranga disradiado eligata de la ĉielo. Li harmoniigas tiun koloron kun la ruĝa de la anĝelflugiloj kaj

helbruna de la vizaĝoj. Dum la XVI-a jarcento la ikonoj pentritaj en Novgorod estas aparte lumoplenaj. Verdeta bluo kaj vermiljono kuntuŝiĝas kun la rebriloj de ia blanka helo, kiuj donas al la bildo grandan esprimoforton. Pli delikatan paletron havas la ikonpentristo en urbo Pskov. Li anstataŭigas la ruĝan koloron per la roza, la brune verdan per la helverda. Li ankaŭ uzas la turkisan, la bluan de la sunumita ĉielo, la orflavan de la suno ĉe zenito disradianta. Kaj tiu radia nuanco, manifestiĝo de la dia majesto, simbolas la lumon de l'lumoj el la spirita reĝolando emananta. En Sver kelkaj artistoj uzis gajbrilan bluan. En aliaj regionoj la ikonroluloj reliefiĝis sur brile ruĝa fono; aliloke jen fonoj blankaj, eĉ palaj okrokoloroj.

LABORMATERIALO UZATA- La grandega plimulto de la rusaj ikonoj estas surligne pentrita. La artisto uzadis fago-, kverko-, karpeno-, foje cedro-lignon. Tiuj arbospecioj estis zorge elektitaj kaj dum la taŭga sezono dehakitaj. Tiam, longe prilaborita kaj sekigita estis la ĉi-koncerna materialo, por ke la tabuletoj uzotaj, kiel pentroebo ne misformiĝu. Zorgeme gardataj ĝis uzo, ili estis kontrolitaj de la ikonpentristo, por ke nenio ebentordiĝo aŭ misformiĝo estu ilin fuŝonta. Oni prefere uzadis, por ikonpentri, sufiĉe dikajn tabuletojn, kiujn oni kavigis por akiri ebenan surfacon kun dika kadraĵo liveranta al la tutaĵo la bezonatan rigidecon. La surfacon de la pretigita materialo oni tuj tegis per maldika ŝmiraĵo el gipso pistmiksita kun alabastra pulvoro; foje en la ŝmiraĵon oni enmetis tolaĵan tavolon. Fine la sekigita ŝmiraĵo estis polurita ĝis akiro de perfekta glataĵo. Tiam pretis la panelo por ricevi la farbon.

Trad. S.-Boniol (daŭrigota)

PAÇO DE LA GEKNABOJ

Ĉu vi havas T-ĉemizon, kiun vi ŝatus ornami per foto, bildo aŭ desegnaĵo? Se jes, jen la aĵoj, kiujn vi bezonas por krei propran, unikan T-ĉemizon:

Ĉ. 0.1 litro da blanka alkoholaĵo uzata por purigi penikojn (atentu! ĝi estas danĝera likvaĵo; uzu ĝin atente kaj tuj post uzo firme fiksi la kovrilon ĉe la botelo kaj remetui ĉi tiun en la ĝustan lokon);

Ĉ. 0.2 litro da akvo (proporcio: unu mezuro da alkoholaĵo al du mezuroj da akvo);

manĝilar - lav-fluidaĵo; ujo en kiu miksi la fluidaĵojn, kun firme fiksebla kovrilo; fotokopio de la foto, desegnaĵo aŭ bildo presota sur la ĉemizon; du ebenaj metalaj platoj samgrandaj, kiel la papero sur kiu troviĝas la fotokopio; tolgladilo, peniko; tapet-glada rulaĵo; lavita, sekigita, gladita T-ĉemizo.

Kaj jen tio, kion vi faru:

Verŝu la blankan alkoholaĵon en la ujon. Aldonu akvon. Vi rimarkos, ke ili rifuzas miksi unu kun la alia! Por persvadi ilin amikiĝi, aldonu guton de la manĝilar-lavfluidaĵo, firme fiksi la kovrilon sur la ujon kaj vigle skuu la tuton. Jen vi havas la magian miksaĵon per kiu transmeti la elektitan ornamaĵon sur vian T-ĉemizon. Kuŝigu

la fotokopion sur unu el la metalaj platoj kaj, per peniko trempita en la magian miksaĵon, plene malsekigu la fotokopion je ambaŭ surfacoj. La alian metalan platon varmigu, sed ne tre, per tolgladilo. Glitigu la varmetan platon en la ĉemizon, malantaŭ la lokon, kie aperu la ornamaĵo. Prenu la fotokopion kaj kuŝigu ĝin sur la ĉemizon precize tie, kie aperu la bildo. Per la tapet-glada rulaĵo milde sed firme rulpremu la fotokopion al la ĉemizo. Atente, ne tro rapide, forprenu la fotokopion kaj pendigu la ĉemizon, por ke ĝi sekiĝu. Por eviti, ke via bildo forlaviĝu de la ĉemizo, fiksi ĝin per la speciala ŝprucfiksilo kiun uzas artistoj por fiksi siajn paŝtelojn.

Ankaŭ aliajn materialojn, ekzemple porcelanon kaj lignon, vi povas ornami helpe de la sama magia miksaĵo, per bildo, desegnaĵo aŭ foto.

ATENTU! sur la ĉemizo aperos spegula bildo de la fotokopio!

Ekzemple:


Ĉi tiu bildo



aperos ĉi tiel



Audrey



La mapuo

En la haitia flaŭro ekzistas grandega arbo, kiu timigas la infanojn kaj eĉ la plenkreskulojn, kiuj, pro neracia timo neniam volas alproksimiĝi al ĝi: estas la "mapuo" (mapou). Dank'al sia giganta silueto ĝi povas regi super la tuta vilaĝo kvazaŭ ĝi estus la reĝo de la tuta ĉirkaŭa arbaro. La infanaro sentas por ĝi ne direblan timon, dum la plenkreskuloj, kvankam agnoskante ĝian utilon, ne tute estas admiruloj de tiu grandega arbo, kiu venas en grandeca ordo ĝuste post la Taverno, la plej granda arbo de Haitio preskaŭ malaperanta nuntempe.

La mapuo konservas la grundan malsekecon kaj ŝirmas la malgrandajn kreskaĵojn per sia ombro, kiu povas superkovri interspacon de kvindek metroj aŭ pli kontraŭ la sunardo. Tamen oni neniam vidos iun ripozi sola en la ombro de la mapuo. Multaj mitoj kaj historioj estas rakontitaj pri tiu granda arbo, kiun, malgraŭ ĝia utilo, ĉiuj kamparanoj ĉiam rigardas, kun sento de malfeliĉo en la koro, kreski en sia ĝardeno.

Eksterordinaraj historioj estas rakontitaj pri la mapuo. Strangaj agoj okazas vespere, en la arbo. Oni diras, ke la mapuo metamorfoziĝas nokte kaj iĝas granda kastelo, kiu estas la ĝenerala estrejo de ĉiuj luphomoj en la vilaĝo, kie ĝi kvazaŭ regas. Dispartigita en

multaj fakoj ĝi estas la sidejo de multaj luphomo-bandoj, kiuj unuope havas sian apartan departementon. Ĝi estas ankaŭ haltejo por aliaj luphomo-bandoj, kiuj vojaĝas tra la lando nokte aŭ por anoj, kiuj vizitas la lokajn bandojn. Tamen la mapuo ne estas nur kastelo; ĝi estas ankaŭ universo, civito, kie oni povas trovi ĉion laŭ sia volo. Mankas nenio. La vinoj kaj la kolorlikvoroj, kiujn oni trovas tie estas la sango de la personoj kaptitaj de la luphomoj, kiujn la princoj de tiu nevidebla reĝlando transformis sub la rigardo de sia reĝo.

Malgraŭ la famaj scienco-progresoj, kiuj perdigas iom da kredito al la mitologio, la evoluado de la filozofia Spirito, kiu disvolviĝas, kaj la racionalismo, neniu en la haitia mondo, eĉ la intelektuloj, povas malkonfirmi tion, kion oni rakontas pri tiu arbo. Oni nur povas resti skeptika. Tamen la vera fakto estas, ke eĉ se iu ne timas la mapuon, tiu neniam akceptas volonte, ke ĝi kresku en lia ĝardeno. Plie, ĉiu povas konstati, ke ĝi ne estas amata, kiel la aliaj arboj.

En kelkaj regionoj oni prezentas oferojn al ĝi, aŭ, kiu scias?, al la princoj kaj al la reĝo, kiuj loĝas tie. La respekto aŭ la timo, kiun ĉie oni dediĉas al ĝi povas starigi multajn demandojn. Ĉu tiuj rakontoj estas legendoj, superstiĉo aŭ veraj rakontoj? Kiu scias?

E.F. Gouthier (Haitio)

LASTATEMPE

APERIS

— "Vojaĝo tra Ĉinio", albumo pri 24 turismaj urboj de Ĉinio.
— "Ĉinlingva Konversacio", elementa kurso por ĉiutaga vivo.
— "Ĉina Antologio" (1919-1949) 55 noveloj, poemoj, eseoj de tiu tre interesa periodo de la ĉina literaturo.
— "Gvidlibro pri Pekino", helpilo por eksterlandaj turistoj.

— "Aŭtobiografio de bakterio". Popular-sciencia legaĵo; facile legebla.
— "Kia miksaĵo". Kiel la ekstera mondo povos partopreni en la festoj pro la Jubilea Jaro? Respondas tiu unuakta komedio de F.V. Dorno.
— "La Langue Internationale du Dr Zamenhof" de R. Gueguen. Franc-lingva taŭga libro por bibliotekoj urbaj kaj lernejoj.

A. ĈEKOŬ

La instruisto de belskribado Sergej Kapitonoviĉ Aĥineev edzinigis sian filinon Natalionje la instruisto de historio kaj geografio Ivan Petroviĉ Loŝadiniĥ. L'edzeca festeno ruliĝis glate kvazaŭ oleita. Oni kantis, ludis kaj dancis en la salono. En la ĉambroj kuris kaj rekuris, kiel venintaj musoj, lakeoj en nigraj frakoj kaj blankaj makulitaj kravatoj. La instruisto de matematiko Tarantulov, la franco Pasdequoi kaj la subrevizoro de la kontrolo ĉambro Jegor Jegoroviĉ Revenĝo sidis unu apud la alia kaj rapide, ne lasante paroli siajn najbarojn, rakontis al la gastoj okazaĵojn pri enterigo de vivantoj kaj esprimis siajn opiniojn pri spiritismo. Ĉiuj tri ne kredis la lastan, sed ili konsentis, ke en la mondo ekzistas multe da nepenetreblaĵoj por la homa spirito. En alia ĉambro la instruisto de literaturo Dodonski klarigis al la gastoj, en kiaj okazoj milita gardisto havas la rajton pafi preterirantojn. La rakontoj estis sekve timigaj, sed tre agrablaj. Al la fenestroj de l'korto alrigardis homoj, kiuj, laŭ sia socia situacio, ne havis la rajton enĉambriĝi.

Je l'noktomezo Aĥineev eniris en la kuirejon por vidi ĉu ĉio estas preta por la manĝo.. Tie, de l'planko ĝis la plafono, moviĝis fumo, kiu konsistis el anseraj, anasaj kaj multaj aliaj odoroj. Sur la tabloj, en artista malordo, kuŝis specialaĵoj de manĝoj kaj trinkaĵoj. Ĉirkaŭ la tabloj, tien kaj reen kuris Marto, ruĝvizaĝa. "Nu, montru do al mi la sturĝon", diris Aĥineev, frotante la manojn kaj antaŭĝuante la manĝon. "Kiaodoro! Mi estas preta engluti la tutan kuirejon. Nu, montru do al mi la sturĝon!" Marto aliris al la benko kaj atenteme levetis la makulitan gazetan folion. Sub la folio, en grandega plado, ripozis kolosa sturĝo, ornamita per kaporeroj, olivoj kaj karotoj. Aĥineev ekrigardis

kaj hais. Lia vizaĝo lumiĝis, l'okulgloboj ruliĝis supren. Li mallevis la kapon kaj elbuŝis sonon de neŝmirita rado. Post iome li krakigis la fingrojn pro plezuro kaj denove eksonigis la lipojn. "He! Sono de varma kiso. Al kiu vi donas kison, kara Marto?" aŭdiĝis voĉo el la najbara ĉambro, kaj en la pordujo montriĝis la pritondita kapo de pedelo Vankin. "Al kiu? Hee...al Sergej Kapitonoviĉ! Bela amanto! Belega! Li estas inter kvar okuloj kun virino...". "Mi nenion kisas", diris Aĥineev embarase, "kion ci pensas, malsaĝulo? Mi nur...mi krakigis la langon nur pro plezuro...pro la plezuro vidi la fiŝon!". "Kantu tion al aliaj!" La buŝo de Vankin faris larĝan rideton kaj malaperis post la pordo. Aĥineev ruĝiĝis. "Kia diablaĵo", li pensis. "Nun tiu ĉi sentaŭgulo iros ĉikani. Li min malhonoros en la tuta urbo, tiu ĉi bruto". Aĥineev timeme eniris en la salanon kaj deflanke serĉis per la okuloj Vankin-on. Tiu ĉi staris apud la fortepiano kaj bravule kliniĝinte diras ion al la ridanta bofratino de la lerneja inspektoro. "Tio ĉi estas pri mi!", pensis Aĥineev. Pri mi, ke la pesto lin prenu! Kaj ŝi, ŝi lin kredas! Ŝi ridas!.. Mia Dio!..Ne, tion ĉi oni ne povas lasi sen atento.. Ne! Mi devas ĉiujn malkredigi kontraŭ li..Mi tuj parolos kun ĉiuj, kaj li..mi lin montros antaŭ la tuta mondo, kiel malsaĝulon kaj ĉikanulon.

Aĥineev ekgratis la nukon kaj, ne ĉesante senti konfuzon, aliris al Pasdequoi. "Mi estis en la kuirejo por informi min rilate la manĝon", diris li al la franco. "Mi scias, vi estas amanto de fiŝoj, kaj mia sturĝo, karulo, havas.. jen, du arŝinojn da longo! Ha! Ha! Jes mi preskaŭ forĝesis.. En la kuirejo okazis al tiu ĉi sturĝo bela anekdoto. Mi eniras en la kuirejon kaj vidas la manĝojn. La sturĝo kuŝas antaŭ mi, kaj mi pro plezuro, pro pikanteco, krakigas la langon. En tiu ĉi momento aperas tiu malsaĝulo Vankin kaj diras..Ha! Ha! li diras. Kio? Kiun vi kisas tie ĉi? Marton? La kuiristinon?" Kia malsaĝulo! La virinaĉo havas vizaĝon kiel.. Kaj

Kaj li.. Kisi? Strangulo!". "Kiu estas strangulo?" diris l'alveninta Tarantulov. "Li, tiu ĉi Vankin! Mi eniras en la kuirejon...". Kaj li rakontas la historion. "Mokulo! Strangulo! Estus pli agrable kisi la kortan hundon ol Marton", aldonis Aĥineev kaj renigardinte ekvidis post si Revenĝon. "Vi parolas tie ĉi pri Vankin?" demandis li. "Kia strangulo! Li eniras en la kuirejon, vidas min apud Marto kaj komencas ŝercadi." "Kiel, li diras, vi kisas Marton?" Li tion ekpensis pro malsobereco. Vi ja scias, por kisoj mi preferus meleagron ol Marton. Ekster tio mi diras al li: "Ĉu ci ne scias, malsaĝulo, ke mi havas edzinon?". Li min ridigis...". "Kiu vin ridigis?" demandis l'apudiĝinta instruisto de religio. "Tiu ĉi Vankin! Mi staras en la kuirejo kaj rigardas la sturĝon..." Kaj cetere... Post unu duonhoro ĉiuj gastoj konis la historion pri la sturĝo kaj Vankin. "Nun li povas babili, kion li volas", pensis Aĥineev, frotante la manojn. "Ke li rakontu! Apenaŭ li ion diros, mi tuj respondos: ŝufiĉe sensencaĵi, malsaĝulo, ni ĉion scias!"

Aĥineev plene trankviliĝis kaj eĉ trinkis kvar superfluaĵajn glasetojn da brando. Kiam la novgeedzoj estis foririntaj el la salono, li venis en sian ĉambron kaj ekdormis, kiel sanktulo. La sekvan tagon li jam forgesis la historion.

Sed, ho ve! La homo proponas kaj Dio disponas! La malbonega lango faris sian aferon malgraŭ la ruzeco de Aĥineev. Post unu semajno, vendrede, post la tria leciono, kiam Aĥineev staris en la ĉambro de instruistoj kaj parolis pri la malvintoj de la lernanto Vergito, la direktoro proksimiĝis al li kaj forvokis lin flanken. "Aŭdu min, Sergej Kapitonoviĉ.. pardonu min.. tio ĉi ne estas mia afero, sed.. mi tamen devas klarigi al vi.. Tio ĉi estas mia devo.. Kuras famo, ke vi havas intiman konadon kun tiu ĉi kuiristino.. Tio ĉi ne estas mia afero.. Vi povas ŝin ami.. Kisi.. Faru, kion vi volas, sed ne faru ĝin.. publike.. Mi petas vin! Ne forgesu, ke vi

estas pedagogo!" Aĥineev ektremis kaj poste koloniĝis. Kvazaŭ pikite de abeloj, brogite de brulakvo, li foriris domen. Li iris kaj al li ŝajnis, ke la tuta urbo rigardas lin, kiel malĉastulon. En la domo lin frapis alia malfeliĉo; "Kial vi ne manĝas?" demandis lin la edzino ĉe tablo." Kion ci pensas? Amuzetojn? Ĉi enuas je Marto? Mi scias ĉion, anatemito! La bonaj amikoj malfermis al mi la okulojn.. Ho, barbaro!" kaj li ricevis vango-frapon. Li leviĝis de la tablo kaj, sen ĉapo, sen pelto, li eliris, kiel kondamnito, direktiĝante al la loĝejo de Vankin. "Fripono!" diris li. "Kial ci min enmetis en koton antaŭ la tuta mondo? Kial ci min kalumniis?". "Kalumniis? Kion vi diras?". "Jes! Kiu do ĉikanis kontraŭ mi, ke mi kisas Marton? Ci ne povas nei, ci, mortigisto!" La vizaĝaj fibroj de Vankin ektremis. Li levis la okulojn al la sanktfiguro kaj diris: "Ke Dio punegu min! Ke miaj okuloj krevu, ke mi mortegu se mi estas dirinta pri vi eĉ silabon. Ke mi estu prenita de pesto!" La sincereco de Vankin estis ekster dubo. Estis okulvideble, ke la ĉikano eliris ne de li.

"Sed de kiu do? De kiu?" pensis Aĥineev, prezentante al si en penso ĉiujn konatojn kaj batante al si la bruston. "De kiu?"

"De kiu?" mi, miavice, demandas la leganton.

el la rusa tradukis A.KOFMAN

(Lingvo Internacia : 1905)



[illegible][illegible]

FOR VIA DISTRO

KRUCVORT-ENIGMO

HORIZONTAL: 1. Subtera voĵo. — 4. Rusa monero. — 9. Kobjoldo en la nordropa mitologio. — 10. Sankta nombro. — 12. Tia estas la bona trankilo. — 13. Rega seĝo. — 16. Granda migra birdo. — 17. Altega konstruaĵo. — 23. Donaci al dio. — 25. Sipista trinkaĵo. — 26. Malnorda. — 27. Vestimalamiko. — 28. Monto de dioj. — 29. Orkora kanta birdo.

VERTIKALE: 1. Muntegaĵo. — 2. Akva kaj arbara diino. — 3. Vira nomo. — 5. Altvadora metalo. — 6. Manglebla riverfluso. — 7. Acida herbo. — 8. Akvego. — 10. Plu al suŝite. — 11. Malviro. — 14. En tiu tempo. — 15. Sempokraste. — 18. Araba edzinejo. — 19. Mondparto. — 20. Tavola ŝtono. — 21. Vira nomo. — 22. Galige distri. — 24. Nomo de lago.

LA VIE DE GRÉSILLON

La 26-an de Decembro venis al ni la novaĵo: tiun tagon, matene, forpasis S-ino Micard. Ŝi estis pli ol 88-jara. De post la morto de ŝia edzo ŝi ne ofte vizitis Gresillon, kies "patrino" ŝi estis dum la unuaj dek du jaroj. Kiam ŝi venis, somere, ŝi ne restis tre longe, ĉar ŝi ne plu renkontis la maljuniĝantajn geamikojn, kiuj ĉeestis dum la pioniraj jaroj. Pro tio multaj esperantistoj vizitintaj Gresillon dum la lastaj dek jaroj konis ŝin nur nome, aŭ ĉar ili aŭdis pri ŝia laboro en la Esperanto-Domo.

Ŝi estis instruistino, kiam ŝi edziniĝis al ŝia kuzo Henri Micard, kiu, pro akcidento, nur tiam rekomencis marŝi post plurjara kuracado. Ŝi estis helpinta lin en liaj studoj, kiuj kondukis lin al instruado. Kiam Henri Micard ricevis la taskon organizi ĉiujare la stud-periodojn "Someraj Lernejoj", ŝi helpis lin, same kiel ŝi jam helpis lin en la materia prizorgo de lia politika kaj sindikata agado. Tute normale ŝi staris apud la edzo, iom en la ombro, kiam li prenis sur sin la starigon de Kooperativa Asocio cele al la akiro de iu taŭga domo por renkontoj de esperantistoj. Ŝi travivis la samajn esperojn kaj malesperojn kiel ŝia edzo ĝis la aĉetado de la kastelo Gresillon, kiun ankaŭ ŝi vizitis antaŭe, kompreneble. Ŝi ĝojis kun li kaj la "pioniroj", kiam la aĉetado efektiviĝis. Ŝi denove travivis esperojn kaj dubojn antaŭ la malfermo de la Esperanto-Domo en 1952, ĉar la laboro nepre farota estis granda kaj la kasenhavo malgranda. Ĉu ni estos pretaj? Ĉu eblos fari tion? Ge-sroj Micard ĝojis, fieris pri la atingita rezulto kaj ili estis honoritaj. Sed por s-ino Micard nova laboro komenciĝis, ĉar ŝi sciis, ke la organizo iniciatita de ŝia edzo pluvivos nur se suprenfaldiĝos la manikoj por ŝpari monon, malpliigi la elspezojn. Kiamaniere? Kiu dum la unuaj jaroj kuiris, purigis la kaserolojn, prizorgis la tukojn? respondo simpla: s-ino Micard preskaŭ sen ekstera helpo. Kiam montriĝis, ke la afero iĝas firma ŝi konsentis pri helpo. Sed dum dek du jaroj ŝi estis la motoro de tre grava parto de la tuta maŝino. Ĉu iu povas aserti, ke, sen ŝia sindonemo, kiu ekzerciĝis en la kuirejo, la purigejo, la ĉambroj, la tuko-lavejo, Gresillon estus pluvivinta? Ŝi estis nepre elemento de la tuto. Ŝi estis tiu elemento, kiu ne distingiĝas de la aliaj, sed kies paneo haltigas la maŝinon. Foje aŭdiĝis sekaj rebatoj kaŭze de laceco. Sed eĉ laca, eĉ grumbra, s-ino Micard daŭrigis la laboron, por la sukceso de Esperanto por alporti al la edzo la nepre necesan apogon. Adiaŭ s-ino Micard. Vi estis ekzemplo, sed diskreta.

Pierre Babin

La komitatanoj de la Kultura Esperanto-Domo
elkore dankas la multajn geamikojn, kiuj,
okaze de la forpaso de s-ino Micard, sendis
konŝolencajn leterojn.

GRAND SUCCES

de la quatrième édition de

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. BABIN

Illustré par L. Poueymarie.

« Vigla lernolibro por la praktikanto »

Prix inchangé : **25 F.** — Rabais habituel
aux groupes et aux Libro-Servoj.

Commandes à : J. Vincent, B.P. 54,
49150 Baugé.

VOUS NE POUVEZ PAS

suivre un cours oral dans votre ville ?

Pourquoi ne pas essayer nos

COURS PAR CORRESPONDANCE

POUR LES DEBUTANTS : 16 leçons illustrées avec de nombreux exercices. Permet d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : **120 F.**

COURS DE PRATIQUE : 14 leçons illustrées. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : **120 F.**

NIVEAU SUPERIEUR : versions thèmes, études de textes ; histoire de l'espéranto et du mouvement espérantiste. Cours et corrections : **90 F.** Notre Libro-Servo peut fournir les livres qui vous manquent.

★★

Inscriptions et chèques à : Maison Culturelle Espérantiste, 49150 Baugé —
C.C.P. Nantes 1485-39 P.

LIBRO - SERVO

Notre catalogue est à votre disposition. Nous vous le ferons parvenir contre un timbre-poste. Nous pouvons vous fournir tous les livres non épuisés et toutes les nouveautés.

Faites vos commandes sur lettre de préférence. Si vous êtes sûr du montant de la commande, joignez un chèque. Sinon attendez la facture qui sera jointe à l'envoi.

N'oubliez pas que les envois se font **franco au-dessus de 200 francs.**

Adressez vos commandes à : J. VINCENT, B.P. 54, 49150 Baugé.

Intitulé des chèques : Maison Culturelle Espérantiste.

NIA KONKURSO



La gajnintoj de la diversaj premioj ricevos personan informon pri la rezulto de nia konkurso.

Ni sube donas la solvojn de la kvar serioj por la partoprenintoj kaj ankaŭ por la multaj legantoj, kiuj faris nur parton kaj ne kuraĝis sendi siajn respondojn.

1. A SERIO :

- 1 — Ĉu li venis trakosme ? (J. Valano).
Kanaĉo el Kananam (K.-G. Linton).
Kredu min Sinjorino (C. Rossetti).
Lasu min paroli plu (C. Piron).
La verdkata testamento (R. Schwartz).
- 2 — **Rabindranath Tagore** (1861-1941). — Hinda.
Fondis Internacian Universitaton en 1921.
« Malsata Ŝtono » tradukita en 1961.
1-a libro de la serio « Oriento kaj Okcidento ».
- 3 — Por eviti nedeziratajn renkontojn.
— Pro la freska scenaro de Giotto.
— Por Kaŝi malbelan ŝankron de terura malsano.
— Signifas : « virtogardanto ».
— Temas pri « La Madono en la Roka Groto ».
- 4 — **Pasigante** — pli stulta — **peza** intelekto **lia** **plej** granda plezuro.

2. A SERIO :

- 1 — Trigroŝa romano (Brecht).
— Homoj sur la tero (S. Engholm).
Vivo kaj opinioj de mastro M'saud (J. Ribillard).
— Fabeloj de la verda piĝo (L. Beaucaire).
— Virino ĉe la landlimo (M. Boulton).
- 2 — Kaproj Kapablas senarbigi terenon.
— Valentin Haŭy rimarkis, ke la blinduloj rekonas la objektojn laŭforme.
— La familio de Valentin Haŭy transloĝiĝis al Parizo, Kiam Valentin estis 6-jara.
— Katerina de Medicis ricevis de Papo Pio la 4-a la desegnaĵon de Mikel-Anĝelo danke pro « ŝia orono mortigi multajn protestantojn ».
— Orfeo iris Inferon por trovi la animon de sia bela edzino Eŭridicia kaj revenigi ŝin teren.
- 3 — **Edmond Privat** (1889-1962).
Vivis en Svisio — profesoro en Universitato kaj verkisto — plurfoje prezidanto de Svisa Esperanto-Soc. — prezidanto de UEA (1923-1933) — prezidanto de Internacia Centra Komitato — Amiko de Gandhi.
- 4 — Jes.
— Jes.
— Ne — **trifose** (1911-1928-1962).
— Ne — « Ĉu rakonti **novelo** ? ».
— Jes — en 1970 maldecaj rakontoj sed titolo : « Kruko kaj Baniko ».

3. A SERIO :

- 1 — La Kastelo de Prelongo (Valienne).
Ezopa saĝo (Kalocsay).
Vagado sub palmoj (Ribillard).
La Faraono (Prus).
Vole novele (Schwartz).
- 2 — Tatin ricevis informojn pri la relativeco de la movo rajdante Karusel-ĉevalon.
— La rabado de Helena okazigis la Trojan militon.
— Ch. Barbier, Kiel artileria ekskapitano, spertis la utilon skribi depeŝon en la malluno kaj ĝin perfingre deĉifri.
— Offenbach neniam vidis la surscenigon de la « Rakontoj de Hoffman ».
— La 6-punkta brajla sistemo estigas nur 63 kombinaĵojn.
- 3 — Estus pli — **lian** fakon — **Konsiderante** — **specio** — bagatelan fakton — **estu** dotita — per.
(Sufiĉis trovi Kvin el ili).
- 4 — **Ne** : André Albault.
Ne : Tutmonda Esperantista **Junulara** Organizo.
Ne : 13-a U.K. en Prago 1921.
Jes : en la unua libro por Rusoj.
Jes : decidita en 1927.
inaŭguro en 1929.

4. A SERIO :

- 1 — Li kaj Ni (Akademianoj).
Sur Kampo granita (Isvan Nemere).
Regulus (Lorjak).
Parnasa Gvidlibro (Kalocsay).
Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo (T. Sekelj).
- 2 — Etienne Dollet estas Konata eldonisto ĉar ĝi estis Kondamnita je morto kaj bruligita en 1546.
— La megalitaj triboj en Azio estis la pioniroj de civilizacio, religiaj praktikadoj kaj magio.
— La « Korektada periodo » estas la periodo malfacila, eĉ doloriga, kiam ĉiuj infanoj komencas paroli, la periodo « ne tiel, sed tiel ».
— Kokoj staras sur francaj preĝejoj ĉar oni kre-dis, ke ili helpas forpeli fulmo-batojn.
— Palimpsesto estas manuskripto sur kiu oni for-gratis tekston por skribi alian.
- 3 — Ne.
— Ne (Waringhien nur legis enkondukon).
— Ne.
— Jes.
— Ne (la 4-a UK okazis en Dresden en 1908).
- 4 — **Kolektivismaj** — pli akriĝon — la **embrio** — **ŝtat**ligo — Konstruos.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (220 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7.00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (80 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (60 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - DALICANTE - (1 300 pes.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (180 n.l.).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiōzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Aurorastraat, 4, 5631 KK EINDHOVEN, pĉk. 209721 (24 gld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bø Marmarvn 2A Oslo 11 (60 kr.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (65 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.